Kiel trafite ni pensis antaŭ du jaroj, ke tio estis nia unua kaj lasta Kristnasko en la mallibereco kaj nordo. Kaj efektive, la pasintjara jam en Samarkando, do „tute” libera, kaj ĉijare...en Irano. Ni ĉiuj multe laboras, por prepari ĝin bele kaj digne. Sinjorinoj „kuiristinoj” kuiras, fritas, bakas, ĉar la 24-an de decembro ni ĉiuj havos komunan „vigilian vespermanĝon”, tradicie polan. Tiun tagon jam de mateno oni metis la manĝejon malgrandan arbeton (tie ĉi ne kreskas pin-arboj, do ion similan), kiun la knabinoj bele vestis per la antaŭe preparitaj ornamaĵoj. Malgraŭ tio, ke la arbo ne estis pino, ĝi bele aspektis. Vespere, kiam sur la ĉielo aperis la unuaj steloj, ni altabliĝis: la tabloj, pro manko de blankaj tablotukoj, estis kovritaj per grandaj littukoj. Ĉiuj memoras la Kristnaskon en Pollando: multaj knabinoj tristas, ĉar ili restis solaj en la mondo: feliĉe ne ĉiuj – en Isfahano estas solaj, sed havas almenaŭ unu el la gepatroj, aŭ en la armeo, aŭ en alia lando. Ĉe la tradicia dividado de oblato multaj ploretas, sed la penso de proksima venko heligas la vizaĝojn.

Finfine aperas la tradiciaj pladoj, niaj sinjorinoj-kuiristinoj vere faris miraklon por trovi preskaŭ ĉiujn ingrediencojn necesaj por prepari ilin. Poste al la salono venas Anĝelo kun flugiloj kaj disdonas al ĉiuj infanoj donac-saketon: ĉiuj kun intereso rigardas, kio estas ene kaj trovas, krom dolĉaĵoj malgrandan objekton. Poste...la kristnaskaj kantoj; la arbeto briletas, la kandletoj bruliĝas kaj ni kantas: „Levu la maneton Diinfano kaj benu nian amatan patrujon”...kaj ŝajnas al ni, ke malgranda Jesuo aŭskultas nin...

*

La tagoj pasas, ni multe lernas, por rekapti la perditan tempon. La vintro alvenas al sia fino, kvankam estas nur komenco de februaro. Sed vintro tie ĉi ne similas al vintro en Pollando: falas malmulte da neĝo (Isfahano kuŝas je 1000 m. super marnivelo). En niaj dormsalonegoj kaj en la klasoj troviĝas specialaj fornetoj – la gasolino gutas farante malgrandan fajron – tio ne produktas multan varmon, estas sufiĉe malvarme.

EN LA „KVINA”

Februaro 1943 --- Kiam la direktorino destinis nin, kun Manjo, al alia lernejo-internulejo, Nr-o 5, komence mi estis tre malkontenta. „De jarcentoj” „La 9-a” kaj „La 5-a” estis en preskaŭ „milita stato” kaj ne ŝatis sin – neniu konis la kaŭzon. Kaj mi devas iri tien? Estis jam vespere, nube, simile kiel en mia kapo...Sed en la „5-a” oni akceptis nin sufiĉe agrable, ni trovis ankaŭ unu konatinon el la „9-a”. Sekvamatene mi reiris „al la lernejo”, kiu troviĝas en la „9-a”. Ĉiuj demandis min, kiel estas en alia internulejo. Poste komenciĝis la leciono. Ĉio iris tre bone, ĉar estis nia amata pola lingvo. Ni devis skribi pri la legendo de „lampiro” kaj mi ricevis tre bonan noton.

Dume „la 9-a” iom post iom likvidiĝis kiel lernejo, ĉar oni metis tie infanojn malsanajn je okuloj. Al „la 5-a” alvenis kelkaj miaj klas-koleginoj, do estis pli gaje, mi ankaŭ translokiĝis al la dormejo, kie estis novalvenintoj.

PASKO 1943

Alproksimiĝadis Pasko. De kelkaj tagoj oni bakas tradiciajn dolĉaĵojn: „baba”-j, tortoj, „mazurkoj”. Ni pentradis la ovojn; bedaŭrinde ne estis akvo-farboj, nur kolor-kraĵonoj. Granda paska tablo surhavis ĉion. Alvenis patro Tomasik, por konsekri la tablon, sur kio mankis nenio: krom kukoj, estis kolbasoj, ŝinkoj, k.s.

Antaŭ la pastra parolado mi enmanigis al li „bondezir-leteron, pri kiu ni laboris kelkajn tagojn.

15.V.1943. – Ni decidis fari „teatron”. Sed kion? Mi proponis, ke ni prezentu „Neĝulinon”. La propono estis akceptita, sed necesis io alia. Post diskuto ni decidis pri jena programo:

1. Du skoltinoj.
2. Arbaraj fantomoj.
3. Kvar jarsezonoj.
4. Neĝulino kaj sep koboldoj.

La provoj daŭris iom pli ol 2 semajnoj, finfine ĉio estis preta. Mankis nur kostumoj. Ĉiu serĉis por si mem kaj ni devis rapidi. Mi por la rolo de princo trovis ĉe unu sinjorino pantalonon, pelerinon kaj ĉapelon kun plumo.

Sabate posttagmeze ni komencis preparadi „la scenon”. Kurteno estis de littuko. La „publiko” jam alvenis. Aŭdiĝas sonorilo kaj la „kurteno” leviĝas: du skoltinoj kantas. Sekvas la dua peco. Sur la scenejo sidas malgranda orfino kaj triste kantas. Kiam ŝi endormiĝas, alvenas al ŝi la panjo (mortinta); la „arbaraj fantomoj” dancas „tristan dancon”...

La tria programo estis gaja: kvar sezonoj. Alvenas „printempo-princino”, en longa kolora robo kun ornamaĵoj kaj travidebla vualo kaj dancas. Akompanas ŝin „papilietoj”. La publiko estas ravita. Sekve la lokon de „printempo” prenas la „somero” (mi mem), en longa flordeseĝnita jupo kaj sur la kapo – florkrono – antaŭ mi kvar knabinoj dancas „kujaviakon” (unu el la polaj popolaj dancoj). Mian lokon okupas nun „aŭtuno” en longa griza vestaĵo kun folioj, ĉirkaŭita de knabinoj-folioj. Poste dancis koboldoj kaj fine alvenis blanka, trista vintro. La sekvanta punkto de nia teatraĵo estis „La neĝulino”, laŭ la fama filmo de Walt Disney.

Mi estis „la princo”, Wanda ludis rolon de la neĝulino kaj Stacha – la malbonan reĝinon; pli junaj knabinoj estis la koboldoj. Nia direktorino estis vere ravita, ĉar ĉion tion ni faris solaj, sen helpo de kiu ajn plenkreskulo! Post la spektaklo la publiko vokis la „junan paron” al la scenejo kaj speciale aplaudis. Ĉio finiĝis je la 21-a horo.

29.V.1943. – Nia lernejo eldonis murgazeton, kiel kutime ĉion faris nia klaso.

4.VII.1943. – Niajn korojn kovris la funebro: oni anoncis, ke la ĉefo de la pola registaro eksterlande, gen. Władysław Sikorski pereis en aviadila akcidento ĉe Gibraltaro...

16.VII.1943. – La lecionoj finiĝis. Post la libertempo ankoraŭ nia (VI-a) klaso havas ekzamenojn por la gimnazio. Posttagmeze oni disponis atestaĵojn kaj mi deklamis. Sinjoro inspektoro, post sia parolado enmanigis al ni kvar (el nia klaso) libro-premiojn.

FERIOJ

Do, finiĝis la labortagoj kaj komenciĝis ferioj senzorgaj (pasintan jaron ni ne havis libertempon!). La tagordo estis proksimume tia: je la 7-a veksinalo, gimnastiko en la ĝardeno (gvidata aŭ de nia edukistino aŭ de unu el ni). Post matenmanĝo, kunpreninte sandviĉojn, ni ĉiuj iris al naĝejo, troviĝanta ĉe persa gimnazio... Post kelkaj tagoj mi jam scipovis naĝi kaj pasigis ekzamenon. Ni revenadis por tagmanĝo – la apetitoj estis grandegaj! Poste, kvarhora (!) ripozo en silento (rigora). Mi preskaŭ neniam povis dormi, do – malgraŭ la malpermeso, mi legis la „Trilogion” de Sienkiewicz. La libroj de la pola literaturo komencis aperadi zorge de la Ministerio pri edukado (ĉe la Pola Registaro eksterlande) en Palestino kaj iom post iom niaj lernejoj disponis pri la ĉefaj verkoj. Malfrue posttagmeze estis jam pli freŝe, do ni ludis

pilkon aŭ sur luitaj bicikloj faris malgrandajn ekskursojn. Krepusko interrompadis la ludadon. Malpurajn kaj tre malsataj ni revenadis por vespermanĝo. Iom da babilado, vespera promenado kaj post komuna preĝo, ĉiuj (bedaŭrinde) je la 21-a devis iri dormi. Larĝe malfermitaj fenestroj alportis al la dormoĉambroj freŝan aeron, tamen ne ĉiam mi povis facile endormiĝi: mi pensis pri la Paĉjo, kie li estis, kion faras?..(Pri la mortigo de ĉiuj polaj oficiroj en la sovetaĵ militkaptejoj ni eksciis fine de 1943) kaj pri nia malproksima Patrujo, tiel suferanta...

De la 11-a ĝis la 18-a de septembro, en la „l-a” al kiu apartenis vastega ĝardeno, okazis la unua skolta tendaro, kio estis vere grandioza travivaĵo por ni.

DJULFA (Ĝulfa)

La 18-an de decembro 1943 ĉiuj gimnaziaj kaj liceaj klasoj translokiĝis al la armena parto de Isfahano, nomata „Ĝulfa”. Tiele ni devis disiĝi kun mia fratino Manjo, ĉar ŝi frekventis ankoraŭ unua gradan lernejon (en la pola lernejsistemo estis 6 klasoj unuagradaĵ, 4 klasoj de gimnazio kaj 2 de liceo). Sed ni ambaŭ jam havis amikinojn, do la disiĝo estis iom mildigita.

La nova ejo konsistis el la longa unuetaĝa domo: teretaĝe troviĝis la klasoj (somere ankaŭ ekstere, en bela granda ĝardeno), kaj je la unua etaĝo – dormejoj. Malsupre estis ankaŭ granda manĝo-salono, laŭnecese servanta kiel legejo, studejo kaj ludejo. Ekstere en malalta domo estis situita granda kuirejo.

La vivo jam estis pli bone organizita, aperis pli da polaj libroj: ni aktivis ĉiam pli serioze, krom la lernejo, en la skolta movado, lerneja ĥoro, teatra rondeto k.s.

Ni kune lernis, loĝis kaj amuziĝis: vintre la lernado okazis teretaĝe, en negrandaj ejoj; somere – en la ĝardeno estis konstruitaj tabloj kaj benkoj enmetitaj en la grundon, sub ŝtofaj tegmentoj. Teretaĝe troviĝis ankaŭ grandega salono, kiu servis kiel manĝejo kaj distrejo. Supre, en sufiĉe grandaj ĉambroj, loĝis la knabinoj kune; ne multaj knaboj (filoj de la profesoraro kaj personaro) loĝis en aparta domo kaj venadis ĉe ni por lerni kaj manĝi. La plej granda parto de la knaboj kaj junuloj troviĝis en kadetaĵ lernejoj en Palestino.

Krom la lernado, ni multe aktivis sur aliaj kampoj: skolta movado, diversaj sportoj, lerneja ĥoro, dancensembloj, teatrado, ekskursoj sur luitaj bicikloj, somere ĉiutaga naĝejo – la „Pola Isfahano” estis malgranda socia nukleo, kun lernejoj, internulejoj, hospitalo, sanatorio...

La lasta granda okazintaĵo estis 6-semajna skolta tendaro, okazinta somere 1945 en unu el la plej grandaj domoj-lernejoj ekster la urbo.

En septembro 1945 komenciĝis la likvidado: la milito jam estis finita, sed la poloj, kiuj pasis tra la „Soveta infero”, ne volis reveni al Pollando, liberigita de la germanoj, sed... submetita al la reĝimo perforte alportita de la orienta najbaro.

Granda parto forveturis al diversaj ekstereŭropaj landoj.

Ĉirkaŭ 5000 estis akceptitaj en Libano: ili loĝis en ok kristanaj (maronitaj) vilaĝoj, proksime de Bejruto.

„La pola Isfahano” en sia granda parto trovis lokon en Zouk-Michael, 18 km de Bejruto, 3 km de la maro, 200 m supermarnivelo, ĉirkaŭ la vojo, kiu kondukis al la montara parto de Libano. En la vilaĝo loĝis ĉ. 400 libananoj, kiuj tre amike akceptis nin, 733 polojn. Ili ofte partoprenis en nia kultura vivo, eĉ komencis lerni la polan lingvon.

En Zouk troviĝis du gimnazioj: ĝeneral-kleriga kun liceo kaj kudristina, ankaŭ unu elementa lernejo.

Por 70 infanoj kaj gejunuloj, orfoj aŭ sen gepatroj surloke – oni aranĝis en aparta granda domo, 2 km de la vilaĝo, internulejon, en kiu ankaŭ mi loĝis kun mia fratino. Post la sciigo pri la mortigo de mia Paĉjo, ia Panjo edziniĝis duafoje je armeno kaj tial restis kun la Avinjo en Teherano.

Ĉiuj aliaj loĝis en private luitaj loĝejoj kaj dometoj. Ĉiu ricevis monon por mem mastrumi.

Por ni Libano, post severa muzulmana Irano, estis preskaŭ Eŭropo. Ni povis libere kaj sendanĝere moviĝi, fari longajn skoltajn ekskursojn, vizitadi Bejruton. Tuta nia eksterlerneja aktivado multe plivigliĝis.

Bedaŭrinde Libano ne povis esti daŭre la celloko de la poloj: en 1947 komenciĝis do vera „ekzodo” el Libano. En la daŭro de la tuta jaro 1947 kaj komenco 1948 – al Britio forveturis ĉ. 3500 personoj, 607 revenis al Pollando, kaj pli malgrandaj grupoj al Kanado, Usono, Aŭstralio, Argentino, k.a.

Mi kaj mia fratino en januaro 1948 iris al Britio: mi volis fini (granda parto de la lernejo iris tien) maturekzamenon. Tion mi realigis en julio (estis la lasta pollingva maturekzameno en Britio) kaj novembre 1948 ni ambaŭ revenis, post okjara foresto, al nia lando.

Sed tio ja estas tute alia historio...

- daŭrigota -



S-ino Ada Sikorska Fighiera laborante

Fotis. David Curtis la 25-an de oktobro en 1978, en la Eŭropa Esperanto Centro en Bruselo.

Aranyköpések – Gyerekszáj / Ridindaj diroj - Infanaj diroj

Fekete-fehér?

Egy esős őszi délutánon az ismerősünk és unokája a kandalló előtt ülve régi fényképalbumokat nézegetett. A gyerek hosszan szemlélte nagyanyja gyerekkori fényképeit, majd egy idő múlva megkérdezte:

- Nagymami, amikor te kislány voltál, minden fekete-fehér volt?

Parkánszkiné Gerő Zsuzsa

Ĉu nigra - blanka?

Dum pluva aŭtuna posttagmezo, sidante antaŭ la kameno, nia konatino kaj ŝia nepeto rigardadis malnovajn fotoalbumojn. Li longe ekzamenis la infanaĝajn fotojn de sia avinjo, fine, post pripenseto, li demandis:

- Avinjo kara, ĉu ĉio estis nigra-blanka, kiam vi estis knabineto?

Suzana Gerő s-rino Parkánszki

A kiskutya

Szomszédaink három éves kislánya, Julika nagyon szeretett volna kutyát, de a mamája nem engedte. Egyszer, amikor átmentünk hozzájuk vendégségbe, Julika boldogan újságolta, hogy a mamája azt mondta, fog kapni egy kutyát. Meglepetten kérdeztük:

- Mikor?
- Majd ha a disznók repülnek. – jelentette be Julika büszkén.

Hundeto

Trijara filineto de niaj genajbaroj ege deziris havi hundon, sed ŝia patrino ne permesis tion. Foje, kiam ni vizitis ilin, Julinjeto informis nin kun ĝojo, ke laŭ promeso de panjo ŝi ricevos hundon. Ni, surprizitaj, demandis:

- Kiam?
- Kiam porkoj flugos. – deklaris Julinjo fiere.

Suzana Geró s-rino Parkánszki

A JAPÁN ESZPERANTÓ MOZGALOM TÖRTÉNETE

Mikor kezdődött a japán Eszperantó mozgalom?

A japán szervezett mozgalom 1906-ban kezdődött. Ez az év csodálatos volt. Először is: Hutabatei Simei ismert író kiadta „Sekai-go (világnyelv) c. tankönyvét Tokióban, Fodor Postnikov. segítségével. Hutabetei Simei tankönyve jól elkelt, sokan aztán ebből tanulták az eszperantót, s közülük aktív eszperantisták kerültek ki.

Másodszor: 1906-ban Georg Edward Gauntlett angol nyelvtanár Okayama tartományban megismerkedett az O'Connor által írt eszperantó tankönyvvel, ő maga levelező tanfolyamot indított: a tanulók száma elérte a hatszázhetvenhetet.

Harmadszor: Kuroita Katumi történész doktor, aki Alfonse Mistlernek a Nagasaki Press-ben megjelent cikke alapján ismerte meg s kezdte tanulni az eszperantót, májusban írt a nyelvről egy cikket a yomiuri újságban. A cikk nyomán híre kelt az eszperantónak. Gauntlett levelező tanfolyamának névjegyzéke alapján ő és még két eszperantista 1906. június 12-én Tokióban megalapította a Japán Eszperantista Szövetséget, szeptemberben pedig sor került az első Japán Eszperantó Kongresszusra is.

Mikor alakult meg a Japán Eszperantó Intézet (JEI)?

A következő évben, 1907-ben volt a második Japán Kongresszus, de aztán a mozgalom stagnálása következett be: a harmadik kongresszusra csak tíz év múlva, 1916-ban került sor. Attól kezdve viszont, eltekintve az 1944-ben második világháború folytán való megtorpanástól, a japán kongresszusok sora mindmáig töretlen. 1919-ben a szövetség

gazdasági állapota olyan rosszra fordult, hogy a szövetség egyszerűen megbénult: elkerülhetetlenné vált egy teljesen új szervezet alapítása. Ez év végén speciális összejövetelt tartottak, ez eredményezte a JEI megalakulását, amely azóta is a japán eszperantó mozgalom fő mozgatója. Revuo Orienta című sajtóorgánuma, mely először 1920 januárjában jelent meg, 2007. januárban elérte ezerhuszonnyolcadik számát.

Milyen volt a mozgalom a második világháború végéig?

A Kína ellen vívott 1921. évi háborút követően, 1933-ban Japán kilépett a Népszövetségből. Az országban háborús szellem uralkodott, végül 1941-ben Japán, szövetségbe lépve Németországgal és Olaszországgal, háborút indított Amerika, Anglia, Hollandia, Franciaország stb. ellen. Ebben a helyzetben egyes eszperantisták maguk is a kormány agresszív politikájának szellemében tevékenykedtek. A JEI sem ezt az utat nem követte, sem pedig ellenállást nem tanúsított. Az eszperantisták többsége az eszperantó ápolásán, védelmén kívül nem tehetett semmit, nem látták előre, mi fog történni, milyen irányt vesz Japán a következőkben. A csendes-óceáni háború elején Japán győzedelmeskedett, de aztán a helyzet egyre rosszabbra fordult. 1944-ben, amikor az amerikai légitámadások veszélye fenyegetett, a Revuo Orienta márciusi számában jelent meg a következő közlemény: „Újságunk rendszeres megjelentetését ezzel a számmal felfüggesztjük”. – A háború 1945. augusztus 15-én ért véget. Szerencsére a légi támadások a JEI helyiségeiben nem tettek kárt, Tokió felégetett pusztaságán a Japán Eszperantó Intézet irodájának épülete ép maradt.

Hogyan fejlődött a mozgalom azután?

A Japán Eszperantó Intézet (JEI) a mozgalmat helyreállította. Tíz évvel a háború vége után, 1956-ban, Japán – a szervezet 80. tagjaként – beléphetett az ENSZ-be; ugyanebben az évben a Japán Eszperantó Intézetet az Eszperantó Világszövetség Japán képviselő tagszervezetének ismerték el.

1960-ban a 47. japán kongresszus felajánlotta az 1965. évi, ötvenedik eszperantó világkongresszus tokiói megrendezését - erre 1965. augusztus 1-7. között került sor. A világkongresszusra negyvenhat országból 1710 személy jelentkezett, Koreából 20, Kínból 12 jelentkező volt, de Koreából végül is csak két fő vett részt.

Milyen a fejlődés az Egyetemes Kongresszus után máig?

1969 májusában meghalt Ossaka Kenzi, a japán Eszperantó mozgalom motorja, a Japán Eszperantó Intézet megalapításának fő kezdeményezője. A JEI általános titkára, Miyake Sihei 1971-ben megvált tisztségétől. A japán eszperantó mozgalomban új hullám és új aktivisták jelentek meg.

Ezekben az években két szervezet működött: a Japán Eszperantó Intézet és az Eszperantó Csoportok Kansajai Ligája (ez utóbbit Miyamoto Masao vezette). Az egyik Japánnak a keleti, másik a nyugati részében játszott fő szerepet. A két szervezet hivatalai ebben az időben új irodába költöztek.

Két említésre méltó szótárat adtak ki ezekben az években: egy japán – eszperantó és (1983) és egy új eszperantó - japán szótárt (2006). Meg kell említeni Yatugatake eszperantóházát, melyet 1994-ben Morita Yooko asszony ajándékozott a Japán Eszperantó Intézetnek (a JEI-nek), hogy az (a francia híres eszperantóközpont mintájára, a szerk.) Japán Gresillon-ja legyen. A 90-es évektől, hála az erős japán gazdaságnak, a japánok minden világkongresszuson részt vesznek, és a kongresszus megrendezését támogatják is, főképp anyagilag.

A politikai stabilizáció és gazdasági fejlődés miatt Ázsiában megteremtődtek az eszperantó mozgalom – nem elkülönülő, hanem az együttműködésre alapozó – fejlesztésének feltételei 1991-ben az *Esperanto* lap. Ázsiában jelent meg, 1994-ben megalakult az Eszperantó Világszövetségnek az ázsiai eszperantómozgalommal foglalkozó bizottsága (Komisiono pri Azia Esperanto-Movado, KAEM), 1996-ban pedig megrendezték az eszperantó első Ázsiai Kongresszusát.

Az Internet korában s a fent leírt körülmények között a japán eszperantisták előtt tágabb perspektíva nyílt, s most az eszperantó mozgalommal kapcsolatos felelősségük is nagyobb, nemcsak Japán tekintetében, hanem az eszperantónak az egész világon való helyzetével kapcsolatban is. A Jokahamában megrendezett 92. eszperantó világkongresszus lehetőségekkel is élve a japán eszperantómozgalom ezután remélhetőleg még energikusabban, még egyenletesebben fog haladni előre.

Szeretnék valamit tudni a japán eszperantó kultúráról

Miyamoto Masao, Ossaka Kenzi, Konisi Gaku, Nakagaki Kojiroo s mások sok japán irodalmi művet lefordítottak eszperantóra. Ugyanakkor Japán – története és földrajzi helyzete folytán – mindig is inkább kívülről fogadott kulturális és civilizatorikus hatásokat, s ezeket aztán a maga viszonyi között továbbfejlesztette, beépítette. Így az eszperantó terén is az a helyzet, hogy nem sok eredeti eszperantó nyelvű alkotás származik japán eszperantistáktól. .

Ezek között vannak Hasegawa Teru „Verkoj de Verda Majo” címen kiadott művei. Hasegawa Teru annak idején követte kínai férjét Kínába és ott a japán elnyomás ellen harcolt, eszperantóul írt – az egész világhoz szólt.

Japánban az eszperantó kultúrához az utóbbi idők legnagyobb teljesítményével a 25 áprilisában elhunyt Ito Kanzi járult hozzá. Összegyűjtötte Zamenhof rengeteg írását, rengeteg Zamenhoffal kapcsolatos dokumentumot, és kiadta 57 kötetes sorozatát (Plena Verkaro de Zamenhof = Zamenhof összes műve).

Könnyű megtalálni a kongresszus színhelyén Hori Yasuo sorozatát, melynek címe: *Raportoj el Japanio* (Jelentések Japánból). Hori Yasuo 1991-ben kezdte írni beszámolóit a japán társadalomról, politikáról, nevelésről, erkölcsről, kultúráról, szokásról stb. 2007-ben jelenik meg tizedik kötete. A másik könnyen elérhető mű a *Japán énekek* (1-6) sorozata, szövegekkel és kottákkal, lejegyzett dallamokkal, Yamada Tadasi szerkesztésében, aki Konisi Gaku segítségére is támaszkodhatott. Szinte minden eszperantóra fordított japán éneket egybegyűjtöttek. Az említett két könyv igazán jó ajándék lesz az önk eszperantista barátainak.

Hori Yasuo cikkét Eszperantóra az *Esperanto* c. lap 2007. februári számából magyarra fordította Pásztor László

HISTORIO DE LA JAPANA ESPERANTO MOVADO

Kiam komenciĝis la japana Esperanto-movado?

La japana organizita movado komenciĝis en 1906. Tiu jaro estis tre mirinda jaro. Unue Hutabatei Simei, konata verkisto, eldonis lernolibron titolitan „Sekai-go”(Monda lingvo) en Tokio, subvenciitan de la rusa kapitano Fjodor Postnikov. Lia lernolibro bone vendiĝis, kaj multaj homoj lernis Esperanton per ĝi, kaj el tiuj homoj naskiĝis aktivaj esperantistoj.

Due en 1906 George Edward Gauntlett, instruisto de la angla lingvo en la gubernio Okayama, kiu hazarde renkontis Esperanto-lernolibron verkitan de O'Connor, komencis korespondan kurson de Esperanto kaj la nombro de la lernantoj atingis 677. Trie, Kuroita Katumi, doktoro pri historio, kiu ekkonis la Esperanton pere de artikolo en Nagasaki Press skribita de Alfonse Mistler kaj komencis lerni Esperanton, skribis artikolon pri Esperanto en majo 1906 en la ĵurnalo Yomiuri, dank'al kiu disvastiĝis informoj pri Esperanto. Surbaze de la nomaro de la Koresponda Kurso de Gauntlett, li kaj aliaj du esperantistoj la 12-an de junio 1906 fondis en Tokio Japanan Esperantistan Asocion, kaj en septembro okazis la unua Japana Esperanto-Kongreso.

Kiam fondiĝis Japana Esperanto-Instituto (JEI)?

En la sekva jaro 1907 okazis la dua Japana Kongreso, sed poste sekvis movada stagnado, kaj la tria Japana Esperanto-Kongreso okazis nur post 10 jaroj, en 1916. Tamen de tiam la japanaj kongresoj seninterrompe okazadas ĝis nun krom en 1944 dum la dua mondmilito.

En 1919 la ekonomia stato de la asocio fariĝis tiel malbona, ke la asocio paralizigis, kaj fondo de tuta nova organizo iĝis nepre necesa. Fine de tiu jaro okazas speciala kunveno, el kiu rezultis la fondiĝo de Japana Esperanto-Instituto (JEI), kiu ĝis nun estas la motoro de la japana Esperanto-movado. La unua numero de ĝia organo La Revuo Orienta eldoniĝis en januaro 1920 kaj ĝi atingis la numeron 1028 en januaro 2007.

Kia estis la movado ĝis la fino de la dua mondmilito?

Sekvante la militon kontraŭ Ĉinio en 1931, Japanio forlasis la Ligon de Nacioj en 1933. Enlande regis militarismo, kaj fine Japanio komencis militi kontraŭ Usono, Britio, Nederlando, Francio ktp. en 1941, aliancante kun Germanio kaj Italio. Sub tiu situacio iuj esperantistoj laboris laŭ la agresa politiko de la registaro. JEI nek sekvis la saman vojon, nek kontraŭstaris. Plimulto de la esperantistoj povis fari nenion krom protekti sian Esperanton, ne povante antaŭvidi kio okazos kaj kien Japanio iros.

Komenca de la Pacifika Milito Japanio venkadis, sed poste la situacio pli kaj pli malboniĝis. En 1944, kiam oni timis aeratakojn fare de Usono, en la marta numero de la Revuo Orienta aperis la anonco „Perioda apero de nia organo ĉesos per la nuna numero”. La milito finiĝis la 15-an de aŭgusto 1945. Feliĉe la oficejo de JEI ne suferis pro aeratakoj, kaj restis sendifekta sur la bruligite ebena tero de Tokio.

Kiel progresis la movado poste?

JEI tuj komencis restarigi la movadon. En 1956, 10 jarojn post la fino de la milito, al Japanio oni permesis membriĝi al Unuiĝintaj Nacioj kiel la 80-a membro, kaj samjare JEI estis aprobita kiel landa asocio de UEA.

En la 47-a Japana Kongreso en 1960 oni decidis inviti la 50-an Universalan Kongreson en 1965 al Tokio. La nombro de aliĝintoj estis 1710 el 46 landoj. El Azio aliĝis 20 el Koreio kaj 12 el Ĉinio, sed efektivaj partoprenantoj estis nur du el Koreio.

Kia estas la evoluo post tiu UK ĝis hodiaŭ?

En majo 1969 mortis Ossaka Kenzi, la motoro de la japana Esperanto-movado kaj de la fondo de JEI. La ĝenerala sekretario de JEI Miyake Sihei ekŝiĝis en 1971. En la japana Esperanto-movado aperis nova ondo kun novaj aktivuloj. Dum tiuj jaroj JEI kaj Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj (kiun gvidis Miyamoto Masao), kiuj ludis gravan rolon respektive en la orienta kaj la okcidenta partoj de Japanio, translokiĝis al nova oficejo. Dum tiuj jaroj menciindaj estas eldonoj de du vortaroj, nome Vortaro Japana-Esperanta (1983) kaj nova Esperanto-Japana Vortaro (2006), kaj Esperanto-Domo de Yatugatake, donacita en 1994 de sino Morita Yooko al JEI, por ke ĝi estu Grezijono de Japanio. De la 90-aj jaroj, dank'al la forta japana ekonomio, japanoj multe partoprenas en ĉiuj UK-oj kaj subtenas, ĉefe finance, la kongreson. En Azio, pro la politika stabiliĝo kaj la ekonomia progreso, naskiĝis kondiĉoj por progresigi la Esperanto-movadon, ne izolite, sed kunlabore. En 1991 ekaperis la organo Esperanto en Azio, en 1994 fondiĝis Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado (KAEM) kaj en 1996 okazis la unua Azia Kongreso.

En tiu situacio kaj en la epoko de interreto la japana esperantistaro ekhavis pli vastan perspektivon kaj pli grandan respondecon pri la Esperanto-movado ne nur en Japanio sed ankaŭ en la mondo. Profitante la okazigon de la 92-a UK en Yokohamo, la japana Esperanto-movado espereble pli forte, pli konstante antaŭeniros.

Mi volas scii ion pri la japana Esperanto-kulturo

Multaj japanaj literaturaĵoj estas tradukitaj en Esperanton pere de Miyamoto Masao, Ossaka Kenzi, Konisi Gaku, Nakagaki Kojiroo ktp. Tamen historie kaj situe Japanio ĉiam akceptis novan kulturon kaj civilizacion de ekstere kaj evoluigis tiuj enlande, do ne multas originalaj verkaĵoj verkitaj de japanaj esperantistoj. Inter tiuj estas Verkoj de Verda Majo de Hasegawa Teru, kiu sekvis sian ĉinan edzon en Ĉinion kaj batalis kontraŭ la japana invado. Ŝi verkis en Esperanto kaj sendadis siajn vokojn al la tuta mondo.

Lastatempe la plej granda kontribuo al Esperanto estas tiu de Ludovikito, s-ro Ito Kanzi, kiu forpasis en aprilo 2005. Li kolektadis multege da Zamenhofaĵoj kaj eldonis la 57-voluman PVZ (Plena Verkaro de Zamenhof).

Kiujn vi povos facile trovi en la kongresejo, tiuj estas unue verkoj de Hori Yasuo, serio de Raportoj el Japanio. En 1991 li komencis verki raportojn pri la japanaj socio, politiko, edukado, moro ktp kaj en 2007 eldoniĝos lia 10-a libro. La alia estas serio de Japanaj Kantoj (1-6) kun muzikaj notoj, kiujn redaktis Yamada Tadasi helpe de Konisi Gaku. Ili kolektis preskaŭ ĉiujn japanajn kantojn tradukitajn en Esperanto. Tiuj du specoj de libroj fariĝos tre bonaj donacetoj al viaj Esperantaj amikoj.

Hori Yasuo
Revuo „Esperanto” februaro 2007

A játék

Anya és kis fia kiengedte a ketrecekből a nyulakat, hogy szabadon futkározva, füvet rágicsálva élvezzék az életet a kert elkerített nyúlfutójában. A nyári fűvön a meggyfa alatt és a ketrecek körül a nyuszik oly vidáman ugrándoztak, játszottak egymással, hogy megirigyelték a kis süldőmacskák.

A kerítésről leugrottak a földre, és először a földhöz lapulva figyelték a nyulakat, aztán elkezdtek hemperegni. Így hívták játszani az ugrándozó rövid farkúakat. A nyulak először csak figyelték őket, nem akarván játszani a hosszú farkúakkal. Aztán hirtelen nekik rohanva elűzték az idegeneket. Ezután a kicsi macskák felültek egy ketrectetőre, és onnan figyelték tovább a nyulak vidámságát.

Eközben az anya a nyúllakásokat takarította, időnként lehajolva az alsó ketrecekhez is. A fiúcska hordta a jó illatú, lucernával kevert szénát és az árpát a már tiszta ketrecekbe.

Hirtelen az anya úgy érezte, hogy a haja beleakadt a ketrec szélfűtta deszkájába, mert a fejét a haja húzódása miatt nem tudta mozdítani sem jobbra, sem balra. Végül, egy kissé mégis sikerült megmozdítania a fejét. Amikor felnézett, akkor látta meg, hogy a cicák gyeplőként fogják a haját.

Az anya óvatosan felnyúlt hozzájuk, és megcirógatta a kicsiket. Erre aztán a pajkos jószágok új játékot eszeltek ki. A hajhúzást abbahagyták. Aztán először az anya fejére ugrottak, majd a hátán végigfutva a földre ugrottak. Onnan fel a kerítésre, aztán le annak túloldaláról a veteményes kertbe és eltűntek a karalábék között.

Pásztor Lászlóné



Ludo

Patrino kaj ŝia fileto ellasis la kuniklojn el la kaĝoj, ke tiuj libere kurante, sin paŝtante, ĝuu la vivon en la ĉirkaŭbarita kurejo de la ĝardeno. Sur la somera herbo, sub la griotlarbo ĉirkaŭ la kaĝoj, la kunikloj saltadis kaj kunludadis tiom vigle, ke la jam iom kreskintaj katidoj ilin ekenviis. La katetoj saltis de la barilo sur la teron; unue, premante sin altere, ili atentis la uinilklojn, poste ili ekis ruliĝadi sur la tero, vokante tiel kunludi la saltantaj mallongvostulojn. La kunikloj komence, ne volante ludi kun la longvostuloj, nur rigardis ilin. Poste alkuragante forpelis ili la fremdulojn. Post tio la katetoj sidiĝis sur la tegmenton de unu el la kaĝoj, kaj de tie ili atentis plu la gajan petoladon de la kunikloj. – Dume la patrino estis puriganta la kuniklo-hejmojn, de tempo-al tempo klinante sin al la malsupraj kaĝoj. La knabeto, ŝia filo, portadis en la jam purajn kaĝojn hordeon kaj bonodoran fojnon miksitajn kun luzerno. Subite la patrino rimarkis, ke ŝia hararo kaptiĝis de ventoblovata kaĝotegmenta tabulo, ŝi ja povis movi sian kapon nek dekstren, nek maldekstren. Fine, tamen, ŝi sukcesis iom moveti la kapon. Rimarkis ŝi nur tiam, ekrigardinte supren, ke la katidoj prenas ŝian hararon kvazaŭ bridon. La patrino atenteme etendis sian manon supren, kaj ekkaregis la katidetojn.

Je tio la petolemaj bestetoj ekpensis pri nova ludo. Ili do ĉesis tiri ŝiajn harojn. Nun ili saltis sur la kapon de la patrino, kaj trakurinte ŝian dorson ili saltis sur la teron. De tie ili saltis sur la barilon, kaj ĉe la fino denove ili saltis al la g rundo, jam en la legomĝardeno.

Poste ili malaperis inter la brasikrapoj.

Adrienne, s-rino Pásztor

A Magyar Költészet napja alkalmából – kérjük – fogadják szeretettel az alábbi verset

Kisspál János Végrendelet

Bogácson, a hegyek alján
Kerestem a kaptárkövet.
Azt a sziklát nem leltem meg,
De találtam szőlőtövet.

A tőkének ága-boga
vékony vessző, a venyige,
rajta függő szőlőfürtök
szüretig a tőke nyűge.

Bogyó még nagyon apró
De dolgoznak már a gének,
Októberre nedűt termel
A borivás istenének.

És a végén jót mulattam
A bogácsi pincesoron.
Ha meghalok, egy pincében
Legyen a halotti torom.

Ni petas, ke okaze de la **hungara Tago de la Poezio** bonvolu akcepti la sekvan poemon:

Johano Kisspál
Testamento

Ĉe montetoj apud Bogács
serĉis mi ŝtonabelujon.
Ne troviĝis tia rokaĉ',
sed mi trovis vinberujon.

Vinberujo disbranĉiĝas,
kaj maldikas en ĝi vergoj,
La vinberoj dependiĝas,
ĝis rikolto estas ŝarĝoj.

Vinberoj ne estas grandaj,
sed en ili estas genoj,
kiuj sukajn igos frandaj,
oferi por Bakĥo, benoj.

Fine iĝis celo, kelo,
amuziĝi. Sort-strangeto.
Se mi mortis jam, en kelo
estu mia mort-bankedo!

Dr. Molnár Lajos – Dr. Farkas Julianna
„NYELVINDÍTÓ” NEMZETKÖZI MUNKACSOPORT

Előzmények

2003 nyarán kezdeményeztük, az Európai Alkotmány létrehozásáról való értekezés első két részének eszperantóra fordítását. 2005 júniusban megjelent a magyar –eszperantó, majd októberben az angol-eszperantó füzet is, meggyőzni az EU döntéshozóit a tényről, - hogy a semleges nemzetközi eszperantó nyelv alkalmazható a legbonyolultabb emberi gondolatok kifejezésére is.

A füzetek előszavában (ld. és konzultálj a <http://www.egalite.fw.hu/konstitucio/> a következő mondatok vannak:

„ Javasljuk, hogy az EU fogadja az Eszperantót mint egyik hivatalos nyelvét, és befolyásolja tagállamainak az eszperantó tanításának bevezetését első idegen nyelvként az alapfokú iskolákban, hogy fejlessze a nyelvtanulás képességét.

Így az EU megvalósítana történelmi tettet és egy generáció idejében minden polgára egymással tolmács nélkül tudna beszélni, megőrizve ugyanakkor saját nyelvét”.

Meg kell vallani, hogy az első javaslat megvalósulása a közeljövőben nem várható, de már van halvány remény, hogy az uniós döntéshozók egyrésze támogatni fogja a második javaslatot.

Véleményünk szerint az európai eszperantistáknak kell elfogadni most mindenek előtt a nemzetközi nyelv képességfejlesztő szerepét!

2005 őszén Dr. Renato Corsetti felhívta figyelmünket a brit eszperantista tanárok „nyelvindító” programjára. Rögtön levelezést kezdtünk Dr. Angéla Tellier professzornővel, aki kollégáival összeállította a „nyelvindító” program tananyagát.

Legnagyobb örömünkre a brit eszperantó tanárok kidolgozták az eszperantó szélesskálájú tanításának módszertanát az elemi iskolákban mint a sokkal nehezebb nemzeti nyelvek tanulásába való bevezetését.

Ennek az elméletnek és gyakorlatnak az elterjesztésére 2006 májusában kezdeményeztük a „nyelvindító” munkacsoport megalapítását. A „nyelvindító” nevet brit barátaink engedélye és beleegyezése után használjuk.

Célok

A nemzetközi „nyelvindító” munkacsoport javasolja, hogy minden gyerek kapjon anyanyelvi nevelést lehetőleg 8. éve végéig, hogy szilárd anyanyelvi ismereteket szerezzenek a beszédet, olvasást, írást és számolást illetően.

Javasoljuk, hogy az Eszperantó legyen az első idegennyelv és képességfejlesztő tantárgy a 9. lo. ll. években és aztán a 12. és 14. években a gyerekek kezdjenek tanulni egy szabadon választott nemzeti nyelvet, hogy az érettségi vizsga alkalmával mindenki legalább középfokon három idegen nyelvet értsen. Időközben egy teljes évet takarít meg az Eszperantó tanuláskönnyítő hatásával. A megtakarított pénz és idő használható más szükséges képességek fejlesztésére.

Gyűjtjük az eszperantisták címeit, akik egyetértenek és készek együtt dolgozni a fent említett célok eléréseért. Külön fontosak azoknak az eszperantista tanároknak a címei, akik már most tanítanak, vagy hamarosan tanítani fogják a nemzetközi nyelvet az elemi iskolákban.

A legfontosabb cél, hogy minden európai országban legyen legalább 1 -5 alapfokú „ajánló iskola”, ahol tanítják az eszperantót. Ez iskolák között a legjobb kapcsolatot akarjuk elérni.

Gyűjteni kell az érveket, melyek meggyőzik a szülőket a nemzetközi nyelv bevezető oktatási hasznosságáról és szerezzenek valóban alkalmazható nyelvtudást.

Meg kell nyernünk az eszperantista tanárok többségének megértését és támogatását.

Az első, minden országban alkalmazható 2 -4 éves tanterv kidolgozása nem lehetséges.

Fejlesztjük azokat a taneszközöket Dr Kovács Katalinnal, az eminens honlap (<http://www.edukado.net>) szerkesztőjével, amelyek pontosan illenek 7 – 11 éves gyerekek tanítására.

A <http://www.egalite.fw.hu> honlapon fogjuk megjelentetni lehetőség szerint legtöbb nemzeti nyelven brit barátaink „nyelvindító” honlapjának általános részeit.

Munkacsoportunk egyik legfontosabb feladata lesz támogatásokat, anyagi eszközöket szerezni az „ajánló alapfokú iskolák” számára.

Végül, amikor a nemzetközi együttműködés első eredményei mutatkoznak, nekünk fel kell hívni az EU neveléspolitikusainak a figyelmét ezekre a jól működő ajánló iskolákra.

Eddigi eredmények

Amikor ezt a vonalat megalkotjuk, a nemzetközi „nyelvindító” munkacsoportnak már több mint 60 tagja van, nem csak Európából, hanem az egész világból. Tagságunk állandóan bővül. Mostanáig a munkacsoport 12 körlevele jelent meg. 2006 október óta – Kádár Sándor segítségével - munkacsoportunknak saját levelezési listája van (lingvolançilo@googlegroups.com). A levelezési lista biztosítja, hogy körleveleink minél

gyorsabban elérjék munkatársainkat és tagjaink, szimpatizánsaink könnyen és gyorsan megbeszélhessék a teendőiket.

A brit „nyelvindító” honlap (ld. A <http://www.springboard2languages.org>) Dr. Dudich Endre, Leo de Cooman, Remy Sproclants, Yves Eechout, Georgios Dermatis és Mészáros István segítségével már megjelent az angolon kívül az Eszperantó, francia, görög, magyar és holland nyelvek a <http://www.egalite.fw.hu> honlapon és a munkacsoport minden tagja megkapta azt mint a 4. körlevél tartozékát.

Flandriai barátunk, Leo de Cooman folytatja a „nyelvindító” honlap más különböző részeinek eszperantó és holland nyelvre fordítását. Az ő fordításai alapján készülnek a többi nemzeti nyelvi variációk.

A Budapesti Orvosi Eszperantó Szakcsoport már megkezdte azon magyar elemi iskolák szerény támogatását, ahol már tanítják az Eszperantót.

2006 ősz óta támogatja és terjeszti a Munkacsoport a „kultúra és a soknyelvű párbeszéd” c. tervezetet, amelynek célja az idősebb gyerekek és fiatalok ismerkedése (középiskolások, cserkészek) a semleges és hídnnyelvvvel. Ld. Dr. Kovács Katalin honlapjának „nyelvtanuló tervezetek” rovatát. (<http://www.edukado.net>). A Munkacsoport tagjai már elkészítették a tervezet több mint 10 nemzeti nyelvű variációját, amelyet összerendez Bulgáriában Mariana Gencseva professzornő.

Már kialakult egy jó együttműködés a Juna Amiko c. ujság szerkesztőivel. Az ujság biztosítani fog egy külön rovatot a Munkacsoport tevékenységének ismertetésére.

Reméljük és várjuk az önök jelentkezését a „Nyelvindító” Nemzetközi Munkacsoportba a következő hálócímen:

ludoviko@freemail.hu

D-roj Ludoviko Molnár kaj Julianna Farkas Internacia Laborgrupo „Lingvolanĉilo”

Antaŭaĵoj

Somere de la jaro 2003 ni iniciatis esperantigon de la unuaj du partoj de la **Traktato pri estigo de Eŭropa Konstitucio**. En junio 2005 aperis la hungara-esperanta kaj en oktobro ankaŭ la angla-esperanta kajeroj – por provi konvinki la decidofarantojn de la EU pri la fakto, ke la neŭtrala, internacia lingvo Esperanto estas aplikebla ankaŭ por esprimi eĉ la plej komplikajn, homajn pensojn.

En la Antaŭparolo de la kajeroj (vidu kaj konsultu ankoraŭ hejmpaĝon <http://www.egalite.fw.hu/konstitucio>) troviĝas la sekvantaj frazoj:

„Ni proponas, ke la EU alprenu Esperanton (en speciala, internacia statuso), kielunu el siaj oficialaj lingvoj; sugestu al siaj membroŝtatoj enkonduki de la instruado de Esperanto, kiel unua fremda lingvo en la bazgradaj lernejoj por evoluigi la kapablon al lingvolernado.

Tiamaniere la EU realigus historian agon kaj ene de tempo de unu generacio ĉiuj ĝiaj civitanoj povus paroli kun la alia, sen interpretisto, konservante samtempe siajn lingvojn”.

Ni devas konfesi, ke la efektiviĝo de la unua propono en la proksima estonto ne atendeblas, sed estas jam pala espero, ke parto de la uniaj decidofarantoj eble subtenos la duan proponon.

Laŭ nia opinio la eŭropa esperantistaro devas do akcenti nun antaŭ ĉio la kapabloevoluan rolon dela internacia lingvo!

Aŭtune de 2005 D-ro Renato Corsetti alvokis nian atenton al la „Springboard” (t.e. „Saltotabulo”/Lingvolanĉilo) programo de la britaj esperantistaj instruistoj. Ni tuj

komencis kun profesorino Anĝela Tellier, kiu kun siaj gekolegoj kunmetis la lernomaterialon de la „Springboard”-programo.

Je nia plej granda ĝojo la britaj esperantisto-instruistoj prilaboris do la metodikon de la larĝskala instruado de Esperanto ĉe bazlernejoj kiel enkondukan en la lernadon de la multe pli malfacilaj naciaj lingvoj.

Por disvastigi tiun ĉi principon kaj praktikon, komence de majo 2006 ni iniciatis fondon de Internacia Laborgrupo „Lingvolanĉilo”. La nomon „Lingvolanĉilo” ni uzas post permeso kaj interkonsento de niaj britaj geamikoj.

Celoj

La Internacia Laborgrupo „Lingvolanĉilo” proponas, ke ĉiu infano ricevu gepatralingvan edukadon laŭeble ĝis la fino de sia 8-a vivojaro por akiri firmajn gepatralingvajjn konojn koncerne la parolon, legadon, skribon kaj kalkuladon.

Ni proponas, ke Esperanto estu la unua fremda lingvo kaj kapabloevoluiga lernobjekto en la 9-a, 10-a kaj 11-a vivojaro kaj poste en la 12-a kaj 14-a vivojaroj la infanoj komencu lerni po unu, libere elektitan nacian lingvon, por ke okaze de la abiturienta ekzameno ili ĉiuj povu almenaŭ mezgrade kompreni tri fremdajn lingvojn. Intertempe ili povas ŝpari helpe de la lernadfaciliga efiko de Esperanto entute minimume la tempon de unu plena laborjaro. La ŝparitaj mono kaj tempo estas uzeblaj por evoluigo de aliaj bezonataj kapabloj. **Ni kolektas la adresaron de tiuj esperantistoj, kiuj interkonsentas kaj pretas kunlabori por atingi la supre menciitajn celojn. Aparte gravaj estas la adresoj de tiuj esperantistaj instruistoj, kiuj jam nun instruas, aŭ intencas baldaŭ instrui la internacian lingvon en bazgradaj lernejoj.**

La plej grava celo estas atingi, ke en ĉiuj eŭropaj landoj kreiĝu minimume 1-5 bazgradaj „referencaj lernejoj”, kie oni instruas Esperanton. Ni volas antaŭenigi la kiel eble plej bonajn kontaktojn inter tiuj ĉi lernejoj.

Oni devas kolekti la argumentojn por konvinki la gepatrojn pri la propedeŭtika utileco de la internacia lingvo kaj prilabori la motivaron por la infanoj, por ke ili lernu Esperanton entuziasme kaj akiru vere aplikeblan lingvoscion.

Ni devas iom post iom gajni la apogon kaj interkonsenton de plimulto de la esperantistaj instruistoj.

La prilaboro de rekomendata, unueca, en ĉiuj landoj aplikebla 2-4 jara lernoplano ne eblas.

Ni disvastigos en kunlaboro kun D-ino Katalin Kováts, redaktorino de la eminenta hejmpaĝo <http://www.edukado.net> tiujn lernilojn, kiuj estas precipe konvenaj por instrui la 7-11 jarajn infanojn.

Sur la hejmpaĝo <http://www.egalite.fw.hu> ni aperigos en laŭeble plej multaj naciaj lingvoj la ĝeneralajn partojn de la „Springboard”-hejmpaĝo de niaj britaj geamikoj.

Unu el la plej grandaj taskoj de nia Laborgrupo estos akiri subvenciojn, financajn rimedojn por la „referencaj bazgradaj lernejoj”.

Fine, kiam montriĝos la unuaj rezultoj de tiu ĉi internacia kunlaboro, ni devos alvoki la atenton de la edukado-politikistoj de la EU al tiuj ĉi bone funkciantaj referencaj lernejoj.

Ĝisnunaj rezultoj

Kiam ni verkas ĉi tiujn liniojn, La Internacia Laborgrupo „Lingvolanĉilo” jam havas pli ol sesdek membrojn, ne nur el Eŭropo, sed el la tuta mondo. Nia membraro konstante ampleksiĝas.

Ĝis nun aperis 12 cirkuleroj de la Laborgrupo. Depost oktobro de 2006 – helpe de S-ro Aleksandre Kádár – nia Laborgrupo jam havas propran korespondan liston (lingvolanĉilo@googlegroups.com). La koresponda listo certigas, ke niaj cirkuleroj atingu la kunlaborantojn kiel eble plej rapide, kaj ankaŭ niaj membroj kaj simpatiantoj tre facile kaj rapide povu priparoli niajn faredaĵojn.

La ĝenerala parto de la brita „Springboard”-hejmpaĝo (vidu la paĝaron <http://www.springboard2languagos.org>) helpe de D-ro Endre Dudich, Leo De Cooman, Remy Sproelants, Yves Eeckhout Georgios Dermatis laj István Mészáros jam aperis krom la angla ankaŭ en esperanta, franca, greka, hungara kaj nederlanda lingvoj sur la hejmpaĝo <http://www.egalite.fw.hu> , kaj ĉiuj membroj de la Laborgrupo ricevis ĝin kiel aldonaĵon de nia 4-a cirkulero.

Nia flandria amiko S-ro Leo De Cooman daŭrigas la esperantigon kaj nederlandigon de diversaj, aliaj partoj de la „Springboard”-hejmpaĝo. Surbaze de liaj tradukaĵoj pretiĝas ankaŭ la pluaj nacilingvaj versioj.

La Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo jam komencis la modestan subvencion de tiuj hungariaj bazlernejoj, kie oni jam nun instruas Esperanton.

Ekde aŭtuno de 2006 nia Laborgrupo subtenas kaj disvastigas ankaŭ la projekton „**Interkultura kaj multlingva dialogo**”, kies celo estas la interkonatiĝo de la pli aĝaj infanoj kaj junuloj (mezlerneĵanoj, skoltoj) per la neŭtrala pontolingvo Esperanto. Vidu la rubrikon „Lingvolernigaj projektoj” de la hejmpaĝo de D-ino Katalin Kováts: <http://www.edukado.net>. La membroj de la Laborgrupo pretigis jam pli ol 10 nacilingvajn versiojn de la Projekto, kiun kunordigas en Bulgario S-ino profesorino Mariana Genĉeva.

Jam elformiĝis bona kunlaboro kun la redaktoroj de la revuo Juna Amiko. La revuo certigos apartan rubrikon por la konigo de la agado de nia Laborgrupo.

Ni esperas kaj atendas Vian aliĝon al la Internacia Laborgrupo „Lingvolanĉilo” ĉe la retadreso ludoviko@freemail.hu



Memorejo en vilaĝo Ziliz

KÖSZÖNTŐ

Szeretettel köszöntjük Wacha Balázs urat, aki 2007. április 1-től újságunk harmadik revizora
Életrajzát a honlapunkon a "Tagok" c. rovatban olvashatják.
Ehhez a munkájához is sok sikert kívánunk:
"Király Lajos" Eszperantó Baráti Kör

BONVENIGO

Tutkore ni salutas sinjoron Blazio Vaha, kiu igxis la tria revidianto de nia gazeto, ekde la 1-an de aprilo 2007.
Lian bibliografion vi povas legi sur la retpagxa rubriko "Anoj".
Ankau al lia cxi tiu laboro ni deziras multe da sukceso:
Esperanto-Amika Rondo "Király Lajos"

NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Király u.25. 2/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Retpošto / E-Mail: pasztor.laszlo4@chello.hu

Weblap / Retpaço: <http://kiralylajos.extra.hu>

MSN: pasztor.laszlo4@chello.hu